

LA ESPERO

Organ för Esperantorörelsen
i Sverige

Utgiven av Förlagsföreningen
Esperanto u. p. a.

OFICIALA ORGANO POR SVEDA ESPERANTO-FEDERACIO (S. E. F.)

12a Jaro

N:o 3

Redaktör: HENNING HALLDOR.
Ansvarig utgivare: W. WAHLUND
Prenumerationspris: Helt år kr. 3:—.
Lösnummerpris: 30 öre.
Annonspris: 10 öre pr mm.
Redaktionens och expeditionens adress
Förlagsföreningen Esperanto, Stockholm 1.

Redaktanto: HENNING HALLDOR.
Responda Eldonanto: W. WAHLUND.
Abonprezo eksterlanden: sv. kr. 4:—.
Prezo po numero: 30 oeroj.
Anonprezo: 10 oeroj po milimetro.
Adreso de redaktejo kaj ekspedejo:
Eldona Societo Esperanto, Stockholm 1, Svedujo.

Marto

1924

Kion svedoj povas fari.

Genevo, Svislando, 21 Febr. 1924.
U.E.A., 12 Boulevard du Théâtre.

Karaj Svedaj Amikoj!

Jam unufoje, antaŭ tridek jaroj, la svedaj esperantistoj savis nian aferon, fondante en Upsala centran internacian organon, kiam nia unua gazeto "La Esperantisto" ricevis mortfrapon en rusa cenzuro.

Nun Esperanto multe progresis de post tiu malproksima tempo, sed ĝi denove suferas malfacilan krizon el eksteraj kaŭzoj. En la momento mem, kiam sukcesaj novaj vojoj malfermiĝis al ĝi, la malriĉeco en multaj landoj ŝanceligas la necesan ekonomian bazon de ĝia movado.

Rezolucio de la Ruĝa Kruco, Raporto de Ligo de Nacioj, Konferenco de instruistoj, Kongreso de komercaj ĉambroj, ekuzo per senfadena telefonio servis kiel ŝtupoj al Esperanto por rapide realigi post la milito en la okuloj de serioza publiko kaj eniri en oficialajn rondojn unu post la alia.

Ankaŭ nia literaturo jam refloris kaj nun ĉiutage kreskas, sed ni ekkuris iom senspire. Nun sentiĝas krizo. Okazoj ekzistas ĉie por iri antaŭen, sed mankas homoj por instrui, mankas oficistoj por korespondi, mankas membroj por subteni, mankas mono por organizi.

UEA, kiu entreprenis la jam cititajn gravajn paŝojn, UEA, kiu ebligas la tujan utiligadon de Esper-

anto per siaj servoj, UEA, kiu donas al nia movado ĝian necesan jarlibron kaj centran organon, UEA havas nur ses mil anojn. Por ekzisti sen defcito, ĝi devus havi 8,000. Por vivi kaj agadi potence, ĝi devus atingi 10,000. Ĉu tio estas ĥimero, nerealigebla revo?

La tuta materialo estas tie; ĉio preta. Sufiĉus presigi kelkmil pliajn ekzemplerojn de ĉio. Du mil novaj membroj certigus vivon sen defcito. Du mil pliaj ebligus veran progresigan potencon. Ĉu vi Svedoj helpas ankoraŭ unufoje?

Mi ĝin demandas al viaj koroj. Ĉu vi povas, ĉu vi volus fari novan klopodon? En via bela lando UEA kalkulas nun 140 membrojn. Via nacia asocio de 400 ĝis 500. Ĉu vi ne povus altigi la nombron de svedaj UEA-anoj de 140 al 250? Tio ne estus miraklo, sed tio multe helpus. Aliaj landoj same provos.

Kvar kronoj jare estas sumeto, sed ne troa por rajti je servoj en la tutmondo kaj ricevi riĉan jarlibron. Dek kronoj ne estus tro por enteni tiun membrecon kun jarlibro kaj plie ricevi ĉiumonate la centran gazeton 20 ĝis 24-paĝan. Dudek kronoj estas kotizaĵo de membro-subtenanto, kiu ricevas plie pakajon da libroj kaj deziras antaŭ ĉio energie faciligi la sukceson de nia afero. Se UEA trovus en Svedujo 40 subtenantoj, tio estus vero, efektiva helpo.

La nomo ne estas ĉio. Ĉefa estas la nombro, la solideco de nia

bazo. Granda internacia movado ne povas almiti la mondon kun nesufiĉa anareto de sesmil membroj internacie organizitaj. Neniu komprenas tion pli bone ol vi, svedaj samideanoj, ĉiam fidelaj je la memoro de Zamenhof kaj ĉiam atente zorgaj pri la sano kaj antaŭenmarŝo de nia afero.

Tial vi sendube pardonos, ke mi respondis tiel malkaŝe al la demando "Kion Svedoj povas fari", kaj vi certe ne lasos mian respondon sen kora, simpatia konsidero. Kun vi ĉiuj, mi sincere deziras, ke la necesa plimembriĝo baldaŭ ĉesigos la krizon kaj ke ni povos repreni niajn gravajn konkerajn taskojn anstataŭ pasigi nian tempon je tiuj administraj zorgoj.

Neniam la mondo pli urĝe bezonis Esperanton kaj Esperantismon.

Frate via

Edmond Privat.

CU VI PROVIS VENDI AL VIAJ
KONATOJ ESPERANTO-
SLOILOJN?

**Årsavgiften i Svenska
Esperanto-Förbundet**

är kr. 5:—, inberäknat prenumera-
tionsavgiften för La Espero.

Insänd avgiften omedelbart!

Världsspråksfrågan inför årets riksdag.

Den outtröttlige förkämpan för nya tankar, borgmästare Carl Lindhagen, har vid årets riksdag ånyo väckt en motion, vari han hemställer, "att riksdagen, såsom representant för det svenska folkets behov och önskingar, måtte samtycka till och begära, att regeringen överväger och, med stöd av sitt folks opinion, verkar för att akten om nationernas förbund av den 28 juni 1919 fullständigast med en bestämmelse på lämplig plats av innehåll, att förbundet vill verka för antagande genom mellanfolklig överenskommelse av ett världsspråk, avsett att inläras i alla världens skolor, ävensom till åtgärder för inrättande av en internationell världsspråksakademi för övervakande av det antagna språkets utveckling och enhetlighet".

Som vi minnas väckte hr Lindhagen ungefär samma motion för tre år sedan, och märkvärdigt nog bifölls den av första kammaren men föll tyvärr i den andra. Hur utgången skall bli denna gång är ovisst.

Åtgärder ha vidtagits från förbundsledningens sida för att inför vederbörande utskott framlägga bidrag till utredning av frågan.

Sedan ovanstående skrivits ingår meddelande om, dels att första kammarens första tillfälliga utskott, som haft frågan till förberedande granskning, beslutat yrka bifall till hr Lindhagens motion, dels att första kammaren vid behandling av frågan vid plenum den 22 mars med 39 röster mot 38 beslutat bifalla motionen. För motionens syften talade hr Pauli, Borell, Lindhagen, Vinberg och fröken Hesselgren. Motståndare voro hr Hederstierna, Andersson i Djursholm och Wrang.

Motionen går nu till andra kammaren.

PRISLISTA

å vårt goda sortiment av esperanto-litteratur sändes på begäran gratis och franko.

Enda inköpskälla i vårt land.

Förlagsföreningen Esperanto u.p.a. Stockholm 1.

Insänd årsavgiften omedelbart

om detta icke redan är gjort.

Även detta nummer tillställs fjolårsmedlemmarna och prenumeranterna, men för att Ni skall erhålla nästa nummer måste avgiften erläggas.

Ännu restera många. Vi hoppas dock att ingen sviker oss utan att alla förra årets medlemmar kvarstå samt även försöka att värva någon ny.

Esperanto-examen.

De som i samband med S. E. F:s eventuella årsmöte i vår ämna avlägga examen i esperanto uppmanas att förbereda sig därtill. För högre examen gäller, att en självständigt utarbetad hemuppsats omfattande minst 600 ord skall vara examensnämnden tillhanda minst 3 månader före examen. Om uppsatsen insändes omedelbart, torde den dock ännu hinna godkännas och examen avläggas vid årets årsmöte.

CU VI PORTAS LA ESPERANTISTAN STELON?

Sveda kroniko.

SUNDSVALL. La 2-an de la parto ni ĉi tie fondigis "Medelpads Esperanto-förbund" konsistantan de esperantistoj kaj interesatoj el diversaj lokoj de la provinco Medelpad. La estraranoj estas: prez. C. W. Sjögren, Sundsvall, sekr. Th. Nilsson, Vattjom, kasisto fraŭlino Ruth Hultén, Sundsvall, konsilanto Per Gelland, Sundsvall, kaj Gustaf Lindahl, Matfors.

La celo estas propagandi la lingvon, prepari lokajn grupojn kaj kunigi la esperantistojn je komunaj interesoj.

Kurso estas jam komencita en Matfors, gvidata de s-ro Th. Nilsson, kaj en Sundsvall tia estas preparita. Prez.



REICHENBERG-MÄSSAN
ANORDNAR ESPERANTOFÖREDRAG PR RADIO.

Den 24 mars kommer hr Scholze att på uppdrag av Reichenbergmässan tala över ämnet "Den tjeckoslovakiska republikens roll vid Europas ekonomiska återuppbyggande". Talet utsändes av radiostationen Kbely.

SÄLLSKAPSPRESA TILL WIEN.

Tjeckoslovakiska rese- och transportbyrån "Čedoh" kommer att till kongressen i Wien anordna ett extratåg Prag—Wien.

INTERNATIONELL SUCCÈS I LYON.

Borgmästare Herriot öppnade den 1 mars en internationell vetenskaplig kongress för främjande av de kommersiella förbindelserna. Redan första dagen antog kongressen en resolution förordande undervisning i och användning av esperanto såsom världsspråk för att underlätta världshandeln.

ESPERANTO SOM OBLIGATORISKT ÄMNE I PARIS-LÄROVERK.

Esperanto undervisas numera obligatoriskt i Paris' kvinnliga handelsinstitut.

GENÈVES REGERING OM ESPERANTO.

Kantonen Genève's regering har nyligen publicerat en rapport från läroverksstyrelsen om den obligatoriska försöksundervisning i esperanto, som under två år ägt rum i folkskolornas högsta klass. Rapporten konstaterar, att barnen lyckats tala och skriva språket efter nio månaders kurs med två lektioner i veckan och att detta studium haft fördelaktigt inflytande på studiet av modersmålets grammatik.

CU VI DEZIRAS, ke UEA vivu kaj prosperu? Se jes, pagu kiel eble plej baldaŭ vian kotizon de Membro-Abonanto. Se vi estas favorito de l'sorto aliĝu kiel Membro-subtenanto aŭ kiel Membro-dumvivanta. UEA bezonas vin!

La kolono de la komencantoj. - Nybörjarnas spalt.

LA HUFO-FERO.

Vilaĝano marŝis kune kun sia filo Eriko tra kampo.

"Vidu!" diris la patro, "jen kuŝas peco da hufofero sur la vojo. Prenu kaj kaŝu ĝin!"

"Ho!" diris Eriko, "vana peno sin klini por tio!"

Silente la patro prenis la feron kaj en-poŝ-igis ĝin. En vilaĝo proksima li vendis ĝin al forĝ-isto por kelkaj oeroj kaj aĉetis ĉerizojn per la mono.

Ambaŭ daŭrigis sian marŝadon. La suno estis bruliganta. Vaste ĉirkaŭe estis nek domo, nek arbo, nek fonto, kaj Eriko preskaŭ pereis pro soifo. Tiam faligis la patro, kvazaŭ okaze, ĉerizon sur la vojon. Eriko levis ĝin kaj enmetis ĝin avide en la buŝon. Post iomete la patro ree faligis ĉerizon kaj la knabo refoje klinis sin egale rapide, por preni ĝin. Tiamaniere la patro devigis Erikon preni ĉiujn ĉerizojn, kaj kiam la lasta estis manĝita, li ridante turnis sin al la filo: — "Se vi estus volinta vin klini unufoje por la hufofero, vi ne estus devigita klinigi tiel ofte por la ĉerizoj".

HÄST-SKON.

En bonde gick tillsammans med sin son Erik över ett fält.

"Se!" sade fadern, "se där ligger en bit av en hästsko på vägen. Tag och göm den!"

"A", sade Erik, "(det är) gagnlös möda att bocka sig för det".

Tyst tog fadern skon och stoppade den i fickan. I en by nära intill sålde han den till en smed för några ören och köpte körsbär för pängarna.

Båda fortsatte sin marsch. Solen var brännande. Vida omkring var det varken hus eller träd eller källa, och Erik nästan förgicks av törst. Då lät fadern, liksom händelsevis, ett körsbär falla på vägen. Erik tog upp det och stoppade det glupskt in i munnen. Efter en stund släppte fadern åter ett körsbär, och gossen böjde sig än en gång lika kvickt för att taga upp det. På så sätt tvingade fadern Erik att taga upp alla körsbären, och när det sista var uppätet, vände han sig leende till sin son: "Om du hade velat bocka dig en gång för (att ta upp) hästskon, skulle du inte varit tvungen att bocka dig så ofta (för) efter körsbären.

XVI-a Universala Kongreso de Esperanto Wien—Vieno.

6—24 Aŭg. 1924.

DUA BULTENO. 25. 2. 24.

La L. K. K. en Wien jam nun, nur komencinte la forsendon de la oficialaj invitoj por la XVI-a, kun granda ĝojo povas konstati, ke la invito en ĉiu lando trovis la dezirindan rezonon. Ĝis la 15-a de Februaro la kongresa oficejo jam posedis pli ol mil aliĝojn. La kompleta nomaro de la kongresanoj estos ricevebla nur dum kaj post la kongreso kiel speciala libro.

La porloĝeja oficejo komencas funkcii, por zorge certigi al ĉiuj kongresantoj kontentigan ripozejon. Neniu dubu pri sufiĉa nombro de taŭgaj, puraj ĉambroj.

Multfoja demando estas pri bezonataj elspezoj por vivado en Wien. Vojaĝanto, tre modesta kaj ŝparema, en Wien nuntempe bezonas nur 2 ĝis 3 svis. frankojn po tage por loĝejoj kaj manĝado. La duobla sumo ebligas ĉiurilatan plibonigon, kaj certe elspezoj de 8 ĝis 10 svis. frankoj po tago por unu persono garantias jam luksan restadon.

La Kongresa Komitato.

Esperantaj nomoj en la praktiko.

Laŭ sciigo en la gazetoj nia samideano E. Beckman en Gävle konstruis novan muzikinstrumenton, kiun li nomis "Espero". Ĝi estas blovinstrumento tre unika, ĉar ĝi ampleksas 4½ oktavojn.

En la urbo, kie loĝas s-ro Beckman, la instrumento estis ludata antaŭ kelka tempo kaj faris bonan sukceson.

En holanda ĝardenista gazeto ni trovis antaŭ kelkaj tagoj novan krizantemon kun la nomo La Espero.

Från Expeditionen.

En del ombud ha ännu icke redovisat för 4:e kvartalet 1923, trots påminnelser. Vi ha så många gånger poängterat nödvändigheten

av punktlig rapportering och talat om förlagsföreningens små resurser, att vi tycka det skulle vara fullt tydligt. Arbeta ni möjligen målmedvetet på att undergräva rörelsens ekonomi?

*

Ett par f. d. ombud ha vi i ofentligt tillkännagivande i tidningen frantagit rätten att vara våra representanter. Av dessa är det åtminstone en, som — utan att ha klarerat sina ekonomiska mellanhavanden med förlagsföreningen — fortfarande uppträder som "samideano", bildar föreningar och är högt uppskattad medlem inom en viss organisation. Vi stämpla detta uppträdande såsom synnerligen simpelt och ingen esperantoorganisation borde befatta sig med den mannen eller vilja räkna honom inom sina leder förrän han gjort rätt för sig.

Ovanstående kan även tillämpas på ytterligare ett f. d. ombud.

Insektoj en Biblio.

Skaraboj en Biblio nur unufoje estas menciataj, nome en la evangelio de Mateo. En la sentencoj de Salomono la formiko dufoje kiel simbolo de laboremo estas glorata. Pri la pulo parolas la predikisto Samuel kaj ankaŭ David ĝin mencias. Ankaŭ araneo, muso kaj pediko kelkfoje aperas en Biblio. Tre ofte oni legas pri abelo. Sed el ĉiuj insektoj menciataj en Malnova Testamento sendube rekordas la akrido. Ankaŭ tion oni povas rigardi kiel denovan pruvon por la danĝera domaĝemo de la akrido en antaŭaj jarcentoj en Malgrandazio kaj en Palestino.

(Naturwissenschaftliche Korrespondenz Dr. Frickhinger, München 2.)

VI PAROLAS pri centmiloj da Esperantistoj. Pruvu ke estas almenaŭ dekmil. UEA bezonas dekmil membrojn. Aliĝu al UEA!

Sveda kroniko.

GRYCKSBO. La 24-an de Febr. La Esperantogrupo de Grycksbo havis jarkunvenon. Ĝi decidis aliĝi al Sveda Esperanto-Federacio. Kiel estraranoj oni elektis: s-rojn Elis Hedbom, prez., Hj. Persson, sekr., Simon Videll, kasisto, Bertil Sörman, vic-prez., kaj Martin Johansson. Reprezentanto de Eldona Societo Esperanto estis elektita s-ro Karl Rydberg.

La grupo havas 20 anojn. Ĝi fondiĝis 1922. Kurso en Esperanto estis aranĝita dum la pasinta aŭtuno.

TORSKORS. Inter Bluj Rubandanoj en Ingatorp, Torskors, Blekinge, gvidas sinjoro Ahnfeldt kurson kun 10 junaj partoprenantoj. F. A—t.

Internationell postkongress i Stockholm.

Världspostföreningens nästa sammanträde kommer att äga rum i Stockholm i år. Internacia Ligo de Esperantistaj Poŝt- kaj Telegrafoficistoj (Ilepto) har vidtagit åtgärder för att vid detta tillfälle frågan om esperanto såsom internationellt samfärdsmedel skall komma på dagordningen. För att giva styrka åt esperanto har det nämnda förbundet igångsatt en petition. Listor ha utsänts till U. E. A:s ombud i alla länder med anhållan om insamling av namnunderskrifter, företrädesvis av affärs- och ämbetsmän samt likställda.

Det hittills inkomna materialet visar sig dock otillräckligt. De esperantister, som kunna hjälpa till med namnsamling, kunna rekvrera listor från D-ro Ed. Spielmann, P. K. 174 Transit, Bern, Schweiz. Men det måste ske raskt, ty före utgången av april skola de återsändas.

Redovisning.

Till följd av det i föregående på begäran publicerade uppropet till esperantisterna i landet att skänka 5 kr. vardera, av vilken summa

hälften skulle tillfalla insamlingen för Zamenhofmonumentet och den andra hälften Svenska Esperanto-Förbundet, ha vi haft nöjet att från en av våra medlemmar mottaga 5 kr. Vi tacka givaren, som tecknar sig J. O. T., och hoppas att flera följa exemplet.

Senare har inkommit 5 kr. från O. Frode, Borgholm, vilket tack-samt kvitteras.

Styrelsen.

Libroj kaj Gazetoj.

Hans Koch: LA ESPERANTISTO EN GERMANIO. Gvidlibro tra la germana lingvo. Sudgermana Esperanto-Eldonejo Oskar Ziegler, Deisenhofen b. München. 184 paĝoj.

Kvankam oni povus opinii, ke tiu kiu scipovas Esperanton ne bezonas lerni la germanan lingvon, tiu ĉi libro certe estos utila al multaj, kiuj volas pli intime interrilati kun la germana popolo.

La libro estas tre praktika. La gramatiko estas klare kaj facilkompreneble instruata. La prononcado de la germana lingvo kredible ne estos perfekta se oni nur lernos de la libro, sed nur Esperanton oni povas ja lerni laŭ libro. Ni rekomendas la libron al studentoj de la germana lingvo.

Tre urĝa.

Estimata Amiko!

Mi ĵus informiĝis, ke la American Radio Relay League (Sek., K. B. Warner, Hartford, Connecticut, U.S.A.) kiu estas la plej gravaj amatora radio-organizaĵo en Usono, dum kelka tempo pristudis la demandojn pri internacia lingvo por Radio. Oni diras, ke la Ligo konsideras aliajn internacilingvajn skemojn krom Esperanto, kaj deziras scii la komparan distastigon de ĉiu.

Ĉar estas plejnecese, ke Esperanto estu konvinke prezentataj laŭ la Ligon, mi forte proponas, ke vi tuj skribu al S-ro Warner je la adreso ĉi-supra, sciigante lin pri via intereso pri la temo Esperanto kaj Radio, dirante, ke via opinio Esperanto estas la SOLA

lingvo konvena por internacia radiado, kaj ke neniu alia estus akceptebla por vi. Instigu al viaj amikoj, kiuj estas interesataj pri la temo, ke ili ankaŭ skribu aparte laŭ sama sencio.

Tre kore via,

H. A. Epton,
Hon. Sekr.

Svenska Esperanto Förbundet

(Sveda Esperanto-Federacio)

Adress: Stockholm 1

har till uteslutande ändamål det mellanfolkliga hjälpspråkets utbredande och befrämjande.

Årsavgift för fristående medlemmar kr. 5:00 inberäknat prenumerationsavgiften för La Espero.

Förlagsföreningen Esperanto u. p. a.

(Eldona Societo Esperanto s. p. r.)

Adress: Stockholm 1

tillhandahåller all slags esperanto-litteratur, utgiver La Espero. Prislista och provnummer sändes gratis och franko.

La Espero

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet.

Adress: Förlagsföreningen Esperanto, Stockholm 1,

utkommer en gång i månaden. Prenumerationspris inom Sverige 3:00. Annonspris 10 öre pr mm.

Prenumeration å veckotidningen

ESPERANTO TRIUMFONTA

mottages för Sverige av Förlagsföreningen Esperanto, Stockholm 1. Pris 1/1 år 12:— sv. kr., 1/2 år 6:—, 1/4 år 3:—

Insänd ett belopp efter råd och lägenhet, så sändes tidningen så länge pengarna räcka.

Izolitaĵ samideanoj

dezirantaj aliĝi al U E. A.

povas ensendi la kotizon, 10 kronoj, al la delegito en Stockholm, redaktoro Henning Halldor, Fridhemsgatan 42, Stockholm C.

Atentu la grandajn servojn, kiujn U. E. A. liveras al siaj anoĵ!

Kom ihåg

att insända medlemsavgiften för innevarande år om Ni ej gjort det förut. La Esperos april-nummer kommer Eder icke annars tillhanda.